

Johann Wolfgang von Goethe,
Super montoj regas kviet'

tradukita de Poul Thorsen

Super montoj
regas kviet',
tra l' foliaro
nur ventet'
spiras kun trem'.
Birdoj arbare silentas,
se vi atendas,
pacas vi mem.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (*1915-01-07 – †2006-01-30).*

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.

Johann Wolfgang von Goethe,
Egalaĵo (Noktokanto de migranto)

tradukita de Manfredo Ratislavo

Super ĉio iĝas
Kviet',
Kaj ne moviĝas
Pro ventet'
Iu foli';
Silentas la birdoj ĉirkaŭe.
Atendu – baldaŭe
Ripozos vi.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-01.*

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)